



MONATA BULTENO de la Esperanta Societo "FRATECO"

INICIATINIO: S-RO IZIDORO FLORÍA - DIREKTORO: RAMÓN DE SALAS

Administracio kaj Redakelo: Str. RODA, n.º 14-16

MALNOVAJ PAĜOJ

MALPLI KAJ MULTPLI

La blank-maneto
De Henrieto
Estas malgranda, ho mia Di!
Sed ŝia koro—
Kia doloro!—
Estas malpli.

Ŝiaj ligharoj
Neordinaraj
Estas longegaj, ho mia Di!
Sed ŝia lango—
Fakto tre stranga!—
Estas multpli.

Ŝia talio,
Die gracia,
Estas mallarĝa, ho mia Di!
Sed la prudento—
Kia turmento!
Estas malpli.

Ŝiaj okuloj
La fajrobrulaj
Estas plennigraj, ho mia Di!
Sed la animo—
Ha, kia rimo!—
Estas multpli.

AMIKO.

KANTETO DE FRAŬLINO

(POPOLA)

Printempo ree floras
Kaj mi denove ploras:
Edziĝas fraŭloj kun fraŭlinoj,
Kaj min nur malmemoras.

Printempo ree venas,
Mi plu min ne ĉagrenas:
Edziĝas fraŭloj kun fraŭlinoj,
Min ankaŭ fraŭlo prenas.

AMIKO.

ARTAJ PAĜOJ

BEDAŬRINDA FORGESO

Mi troviĝis en pentra Muzeo akompanate de simpatia, ĉarma kaj iomete sentimentala amikino. Tre anime ni diris niajn diversajn vidpunktojn pri la verkoj de Unceta, Roland de Moïse, Cantarini da Pessaro, Gourdon, Haes kaj aliaj pentristoj.

Mia amikino, tre observema, rigardis atente eĉ la plej nevalorajn detalojn.

La pentraĵoj de Guercino kaj la desegnaĵoj de Dominichino kaj Mengs mirigis ŝin. Antaŭ kelkaj gravuraĵoj de Alberto Durer, ŝia vizaĝo malĝojiĝis. Ŝi direktis al mi demandan rigardon.

Komprenante, ke ŝi estis dezireganta scii mian opinion pri ili, mi diris:

"Vidu la melankoliajn figurojn, kies vizaĝo mienas, oni ne scias ĉu parolante pri diecoj kaj mistikajoj, aŭ pri profundaj malkvietoj, kiuj iom post iom plenigas la animon je malgajaj pensoj.

La pejzaĝo trankvila kaj silenta estas la karaktero, la temperamento de la germana artisto. La ĝusta, spirita portreto de la pentristo de Nuremberg".

Kiam mi finis paroli, eniris en la salonon, kie mi estis, du francaj sinjorinoj, al kiuj unu el la gvidistoj de la Muzeo klarigis laŭvice la signifon de la verkoj. Ni atentis interesate, kion diris la klariganto. Post kiam li parolis supraĵe pri la pentraĵojn, li akompanis ambaŭ sinjorinojn en alian salonon. Tiam mia amikino, montrante surprize por la okuloj pentraĵon, demandis al mi:

"Ĉu eble ĉi tiu verkaĵo, "Madono kaj Infano Jesuo", havas nenian meriton?"

Mi, malgaje ridetante, respondis al ŝi: "Vi vidas ja, ke ĝi estas alloga, mirinde bela, ege valora, kiel ĉiuj kreitaĵoj de Adrián Isembrandt. Ĉu vi ne rimarkas ĉe la vizaĝon de Madono la veran, la nekompareblan, patrinan amon?"

Denove ŝi rigardis konsente la pentraĵon kaj, post kelkaj momentoj, mi daŭrigis:

"La gvidisto diris nenion pri ĝi. Kial? Mi tute

ne scias, kvankam mi juĝas tiun silenton maljusta kaj nepardonebla, ĉar mi komparas la talenton de Isebrandt kun tiu de Filippo Lippi, kaj liaj verkoj, pro la harmonia koloro kaj la ĝusta kaj zorga desegno, estas pendigindaj apud tiujn de Rafael, Correggio kaj Andrea del Sarto. Sed pensu, amikino mia, ke la homoj forgesas ĉion frue. Bedaŭrinde ili prokrastas atenti pri la laboro realigita de la sciuloj kaj de la artistoj. La homoj premias tiun laboron, jes, sed... post la morto! Kaj tiam ili kredas esti sufiĉe dankaj, jetante florbukedon sur la tombojn de la nemorteblaj genioj, de tiuj genioj, kiuj progresigis la civilizaciojn aŭ korektis la erarojn de dekadencan arto. Jen la kruda realo, mia kara”.

ĜNun, skribante ĉi tiujn liniojn en mia silenta ĉambro, milde karesate de la printempaj sunradioj, mi ne scias ĉu ni plu parolis pri arto aŭ ne. Nur mi memoras, ke kvar aŭ kvin minutojn poste ni estis forlasintaj la Muzeon, kaj ke for, en la ĝardenoj, la birdoj kantadis gloire, tute fremdaj al la nedankemo de la homaro.

JOSÉ GASCÓN.

La Akcentado en Esperanto

Konsente kun la ideoj, pri kiuj temis mia artikolo publikigita en la februara numero de NIA VIVO de 1933 “Ecoj de Helplingvo”, jen estas la regulo 10-a de la Fundamento de Esperanto, laŭ kiu en nia lingvo ĉiam oni devas akcenti la antaŭlastan silabon de ĉiu vorto.

La esperantistaro obeas, kvankam ne ĉiam, ĉi tiun regulon konsciante laŭŝajne nur pri ĝia simpleco. Sed estas ankaŭ alia grava utilo, kiun ĝi liveras okaze de interparolado krom la agrabla, ne sufiĉe laŭdata parolmuziko tiel multe beliganta nian lingvon.

En hispana, franca kaj angla lingvoj, kaj supeble en preskaŭ ĉiuj ceteraj naturaj, estas sufiĉe granda malfacilo por bona kompreno de fremdulo la fakto, ke la indiĝena parolanto kunigas laŭ grupoj la rapide prononcatajn vortojn tiel, ke, kvankam la fremda aŭskultanto aparte konas foje ĉiun el ili, tamen ofte ne sukcesas ĉe la diritaj frazoj rekoni kaj apartigi ilin en sia menso por ilia tuta elkompreno. Tio ja okazas ĉar estas en la vortoj neniu certa sonsigno, per kiu oni povus rapide kaj nekonscie scii, kie komenciĝas vorto kaj kie finiĝas. Oni rajtas diri, ke ĉiu paroladas sian naskiĝlingvon, ne laŭ vortoj, sed laŭ frazoj. Nerefutebla pruvo por tio ĉi estas la granda malfacilo, per kiu la nekleruloj kaj infanoj apartigas trafe la vortojn okaze de skribado.

En nia helplingvo Esperanto ni, kontraŭe, havas la tiucelan rimedon liveratan de la fundamenta regulo, kiu aŭtomate ebligas la instinktan rekonon je ĉiu bone prononcata vorto, ĉar la akcento montras ĉiam la antaŭlastan silabon kaj, kiam ni ĝin aŭdas, nekonscie jam scias, ke ĉe la sekvonta silabo la vorto nepre finiĝos kaj tuj komenciĝos alia. Duboj kaj eraroj pro tio ĉi estas do preskaŭ neblaj. Se ili okazas foje, tio estas kaŭzata de aliaj kialoj, nome: nescio je vortoj, malbona aŭdo, negusta literprononco ktp.; kaŭzoj cetere ekzistantaj ankaŭ en ĉiuspecaj lingvoj.

Tamen tre ofte oni nekonscie kaj nevole akcentas malĝuste iajn vortojn, ĉu pro la emo

diftongi la grupon **i** kun alia apuda vokalo, precipe **e**, ĉu pro aliaj kaŭzoj. Ekzemploj ĉe ni, la hispanoj, estas la vortoj: maniero, -feino, foiro, naiva, kiel, tiel, dudek, tricent ktp. prononcataj: ma-NIE-TO, FEI-NO, FOI-RO, NAI-VA, KIEL, TIEL, DU-DEK, TRI-CENT, anstataŭ: ma-ni-E-ro, fe-I-no, fo-I-ro, na-I-va, KI-el, TI-el, DU-dek, TRI-cent. Ankaŭ ĉe la germanoj, hungaroj kaj aliaj fremdlandanoj ni rimarkis la prononcon: A-lia, ger-MA-nio ktp. anstataŭ: a-LI-a, ger-ma-NI-o. Oni do devas peni apliki la regulon pri la akcento dum parolado, kiel eble plej ekzakte, se oni volas atingi la diritan, gravegan rezultaton tiel utilan en praktiko.

RAMÓN DE SALAS.

INTERKOMPRENO

Al la tre klera esperantverkistino Pilar Salvo.

Mi foriris el tiu ĉi mondo tute malkontenta. Irante la alian mondon mi pensis ke estas maljustaĵo ke en la lasita mondo, kiam iu malproksimiĝas iomete el sia hejmo ne estas komprenata de la aliaj.

Kaj mi pli rimarkigis la homan maljustecon tial ke al mia ĉiam akompana hundo ne okazis same. Ĝi renkontiĝis, kun aliaj hundoj kaj ili interkompreniĝis, laŭ mi povis konscii pro la gajaj movoj de iliaj vosto kaj oreloj. Mi opinias ke al la homo mankas vosto kaj oreloj tiel inteligentaj ol tiuj de la hundoj.

Mi iradis kun tiuj pensoj kiam sur la vojo mi renkontis homon kies aĝo estas tre malfacile divenbla. Ĉu li estas maljuna, ĉu juna?

Mi lin rigardis atente ne kuraĝante paroli ĉar certe li ne komprenus min. Mia hundo iris al li, lekis liajn manojn, karese movis sian voston, kaj la homo ridetante donis al ĝi sukeraĵon. Ili ekamiĝis. Ĉu tiu homo estas de hunda gento? — mi pensis por mi.

—Ne sinjoro, ne — diris la nekonatulo — Mi estas homo kaj ĝi estas hundo...

Mi miregis kaj hontis pro tio ke li divenis tion kien mi pensis.

—Iru denove al la mondo — konsilis al mi — Nune vi povos paroli kun la aliaj. Ĉiuj parolas la saman lingvon.

Mi obeis. Mia hundo de tempo al tempo turnis sian kapon al la homo, movis la voston kaj sekvis la irado apud mi...

Mi iris denove en la parolejo kie antaŭe mi nenion komprenis kaj mi tuj surpriziĝis aŭdante vortojn plene kompreneblajn.

Mi sidis apud tablo kie unu parolis kaj multaj aŭskultis tre atente. Li parolis la saman idiomon kiel la mia. La aŭskultantaro ĉu ridas ĉu plaŭdas... sed mi tute enuigis.

ĜDume mia hundo estas entuziasmema kun hundino...

Unu el la aŭskultantoj diris al mi: Sinjoro, tiu parolado ne estas por via menso... La parolanto estas granda scienculo kaj via kapo estas malplena de ideoj. Vi estas tro mallerta...

Mi foriris. Mia hundo suprenigis postan kruron, lasis malsekan postsignon kaj ni denove iris tra la longa vojo.

Revenu, revenu alian fojon — diris al mi la nekonatulo — Vi povos interkomuniki viajn ideojn.

Guste, tiel okazis. Miaj pensoj estis kontraŭdiritaj de ili.

Mia hundo estas apud alia hundo, sin rigardante reciproke kun mieno de malmultaj amikoj... De tempo al tempo, el la hundaj ventroj eliras malamaj bruoj kiuj fine devenigis en mordanta batalo.

Ankaŭ ĉe la parolantaro okazis malagrabla sceno: Ekkrioj, minacoj, insultoj, batoj...

Ni eliris; mia hundo kun la vosto pli mallonga, kaj mi kun vundo en la kapo.

Ne malpacienciĝu, karulo—diris al mi nekona-tulo—Jam vi atingis ke la buŝoj sin komprenu, poste ke la mensoj estu samrangaj. Nune mankas ke estu la koroj vestitaj de la menso kaj pere de la buŝoj, kiuj sin komuniku. Laboru por tion atingi.

Mia hundo movante la voston lekis liajn manojn.

JOSÉ ORÓS.

La Edziĝintoj

Ĉiam, kiam renkontas edziĝintoj fraŭlon, por tiu ĉi lasta estas la gratuloj de la unuaj.

—Feliĉa vi!

—Vi komprenas la vivon!

—Volu esti ĉiam en la feliĉa stato, en kiu vi nun estas.

Sed kiam la fraŭlo respondas, ke eble ne estas tiel malbona la edza vivo, ĉar preskaŭ ĉiuj edziĝas, la aliaj ĉargrenas lin per siaj argumentoj.

—Ha, ja oni konas, ke vi ne scias, kio estas tio!

—Se vi sciis, kian inferon serĉas, kiu edziĝas!

—Ne rifuzu la liberecon, kiun vi ĝuas nun, eĉ por ĉio de la mondo.

La fraŭlo volas scii klare.

—Sed, klarigu, sinjoroj; ĉu tiel malbone vi iras?

—Homo! ...

—Mi diros al vi...

—Kompreneble ne devigas nin la edza vivo pafi kontraŭ nian kapon; sed tamen...

—Atentu, sinjoroj, Sen malklarigaĵoj nek du-
onvortoj. Ĉu vi estas bone aŭ malbone en la edza vivo? Parolu tutklare sen deflankiĝo ne enmikso je aliaj aferoj.

—Mi, knabo, vere ne havas kialon por plendi.

—Mi, same.

—Kaj mi, malpli.

—Viro vivanta pli libera, ol mi, ne ekzistas, nek fraŭlo, nek edzo, nek vidvo. Mi iras, kien mi volas, reiras, kiom mi deziras; kaj tiu peco el pano, kiun mi havas en mia hejmo, neniam diras al mi ion, nek demandas, nek mienas malkontente.

—Pri tio, nenion mi enias al iu ajn naskito.

—Rilate al mi. Se iam bonsortulo trovis idealan virinon, tiu estas mi.

La fraŭlo freneziga. Pensante laŭ logiko li demandas sin mem, kial tiuj viroj abomenas ĉiuhore sian staton, kiu taŭgas por ili tre bonege.

Ĉar, nature, se la unua diras, ke li havas en sia hejmo anstataŭ edzino hienon kaj la dua diras, ke li havas virinon, kiu amarigas liajn tutajn horojn tagajn kaj noktajn kaj la alia viro rakontus terurajojn pri sia edza vivado, la fraŭlo komprenus, ke ili vivas tre malkontentaj je sia sorto kaj sopirante ŝanĝi ĝin. Sed tiel...

* Li kredas, ke ili ne diras ja la veron aŭ menso-gas, kiam ili certigas, ke ili bedaŭras esti edziĝintaj aŭ fine, ke tiaj plendoj estas kiel multaj aferoj, kiujn oni diras nur por paroli pri io.

El la tri hipotezoj tiu ĉi lasta, estas certe la plej proksima al la vero.

El la hispana tradukis,

JOSÉ DOMEQUE FAÑANÁS.

SCIIGOJ

La rondeto "Esperanto kaj Paco" de Zaragoza sciigas al la tutmonda esperantistaro, ke, ĉar estas finitaj la glumarkoj de ĝi eldonitaj, nuntempe oni disdonas la mendojn ĝis nun faritajn.

Kiel ni jam diris en la pasinta numero de NIA VIVO la novaj mendoj (pretaj por dissendo) kostas iom pli. La novaj prezoj estas:

Por duona milo.	1,60 pesetojn (aŭ 4 respondkuponojn)
Por unu	» 2,40 » » 6 »
Por du miloj.	4,40 » » 11 »
Por tri	» 6,40 » » 16 »
Por kvar	» 8,40 » » 21 »
Por kvin	» 10,40 » » 26 »

"E. k. P.", poŝtrekomende dissendas poŝtmante aŭ per respondkuponoj antaŭpagitajn mendojn (minimume po duona milo da glumarkoj) sen pluaĵ pagoj.

La enlandaj geesperantistoj povas ankaŭ sendi la monon, per poŝtmarkoj de 0,30 kaj 0,10 pesetoj. La ĉi tieaj esperantistoj povas mendi la glumarkojn po 2,00 pesetoj ĉiun milon.

Ankaŭ eldonis la rondeto "Esperanto kaj Paco" praktikajn kovert-leter-cirkulerojn por ŝpari afrankokoston.

Ili konsistas el presita cirkulero, en kiu estas ekstere esperanta propagando hispane, angle, france, germane kaj itale. Interne estas 15 demand-respondoj, per kiuj oni povas fari pli, ol 100 precize kombinitajn demand-respondojn. Kompreneble tiuj ĉi estas la plej uzataj dum ordinara kaj ne speciala korespondado. Sufiĉas—por uzi ilin—ĉirkaŭstreki la numeron de la demand-respondoj, kiuj formas la frazon esprimantan deziron de korespondant(in)o. Estas necese afranki ilin, kiel *presaĵo* nur.

"E. k. P." dissendas antaŭpagitajn mendojn. La prezoj estas:

0,80 pesetojn aŭ 2 respondkuponojn, 25 ekzempleroj.

1,20 pesetojn aŭ 3 respondkuponojn, 40 ekzempleroj.

1,60 pesetojn aŭ 4 respondkuponojn, 55 ekzempleroj.

2,00 pesetojn aŭ 5 respondkuponojn, 70 ekzempleroj.

Se oni deziras la mendojn poŝtrekomenditaj, tiam aldonu 0,40 pesetojn, aŭ 1 respondkuponon por Eksterlando kaj 0,30 pesetojn por Hispanlando por ĉiu mendo.

La ĉi-tieaj esperantistoj povas mendi tiujn ĉi cirkulerojn po 1 peseto ĉiun kvindekon.

Disloto de Libroj

AKTO: En nia societejo je la 8.^a vespere, kun ĉeesto de la Komitatanoj sinjoroj Larruga, Puértolas, Muñoz, Martínez, Til kaj Uñez, kaj antaŭ kelkaj aliaj kunsocietanoj komenciĝas la lotado. Sinjoro Sekretario legas la titolojn de la dislototaj libroj. Poste antaŭ la ĉeestantoj oni montras, tondas, faldas kaj enmetas en kesteton la numerojn. Sekve Fraŭlino Casanovas elprenas el la kesteto 18 numerojn, al kiuj apartenas la premioj laŭorde de ilia apero.

Jen la premiitaj numeroj:

1. ^a	Originala Verkararo de Zamenhof ...	846
2. ^a	La Faraono	701
3. ^a	Kompleta Gramatiko	115
4. ^a	La Praktiko (unuĵara abono)	258
5. ^a	Fundamenta Krestomatio	567
6. ^a	La Amo en la Jaro 10.000	19
7. ^a	Lingvo, Stilo, Formo	814
8. ^a	Vivo de Zamenhof	715
9. ^a	Esperantlingva Növelbiblioteko (6 volumoj)	90
10. ^a	Ilustrita Biblioteko (1. ^a serio)	954
11. ^a	Ilustrita Biblioteko (2. ^a serio)	479
12. ^a	La Kreitaj Profitoj	185
13. ^a	La Kreitaj Profitoj	557
14. ^a	Kompleta Esperanta Rimvortaro ...	50
15. ^a	A. Dürer	411
16. ^a	Lingvaj Respondoj	332
17. ^a	En Okcidento Nenio Nova	998
18. ^a	Fine Mi Komprenas Radion	27

Kaj por tion atesti subskribas ĉi tiun akton la sekvantaj sinjoroj en Zaragoza la 14-8-1934. Sekretario, J. Uñez.—Aliaj Komitatanoj: José Martínez, Lorenzo Til, Jesús Puértolas, José Larruga kaj José Muñoz.—Ĉeestintoj: José Vergara, Cirilo Julián, Jesús Murillo kaj María Casanovas.

Literatura Konkurso

“Frateco” aranĝis literaturan konkurson por ĉiuj hispanaj esperantistoj, nur celante inciti la komencantojn verki per la esperanta lingvo. Ĝiaj reguloj estos la jenaj:

Unua. Oni donos tri premiojn por la tri verkoj, kiuj laŭ opinio de kompetenta juĝantaro estos plej perfektaj, ĉu gramatike, ĉu literature.

a) En Okcidento Nenio Nova por la esperanta, originala verko pri iu ajn temo ne traktanta sociajn, religiajn aŭ politikajn aferojn.

b) La Faraono (3 volumoj) por la plej bona tradukaĵo en esperanto de la jena poezio:

Cayó en el mar una gota
desprendida de una nube,
y aunque el nivel luego sube,
ni el mar, dormido, lo nota.

Lanza el hombre una verdad
hija de estudio profundo,
y aunque se estremece el mundo,
no la ve la humanidad.

La gota en el mar caída
círculos sin fin describe,
y con la verdad recibe
la humanidad nueva vida.

No te canses de brotar:
brota, pensamiento, brota,
pues sé que una sola gota
levanta el nivel del mar.

JOSÉ DE VELILLA.

c) Vivo de Zamenhof por la originala, esperanta verko, kies temo estas: Reguloj por la plej bona propagando kaj organizo en Hispanlando de la Esperanto-Movado.

Dua. La verkojn oni devas sendi en fermita koverto kun lemo, per klaraj literoj, se estas eble maŝinskribite, kaj ili devas ne esti pli longaj, ol du kolonoj de la gazeto NIA VIVO. Ĉiu verko devas esti akompanata de koverto kun la sama lemo, en kiun oni metos la nomon kaj adreson de la aŭtoro.

Tria. Limtempo por sendi la verkojn estos la 30-a de la proksima monato novembro de tiu ĉi jaro, kaj pri la verkajoj senditaj oni ne interkorespondos, nek ili estos resendataj.

La premiotaj verkoj estos publikigataj en NIA VIVO, kaj la adreso por sendi la verkoj estas nia societa hejmo: Roda, 14-16, pral.

PENSOJ

Se vi prenas rolon, kiu estas super viaj fortoj,
vi ne sole ludos ĝin malbone, sed vi ankaŭ forlasos tiun, kiu vi povus plenumi.

(Epictetes).

Kie ajn oni trovas homon, oni povas fari bonfaron.

(Seneko).

Ĉe virinoj la plej bona sinornamo estas ĉasteco; ĝi estas la sola beleco, kiu malcedas al la insultoj de la tempo.

(La sama).

En la mondo konvenas paroli kaj silenti ĝustatempe.

(Reĝo Frederiko II).

Ne estas sento pli nedisigebla de nia esteco, ol la sento pri libereco.

(La sama).

Plej malmultekosta amiko estas bona libro.

(Abontaub).

Granda volo naskas grandan kuraĝon.

(Trembley).

Viro estis farata, kiel ĉiuj ceteraj bestoj, en la kamparo; virino estis farata en la paradizo.

(Agrippa).

En la absolutaj regadoj oro estas pli potenco, ol despoto.

(Ali-Baja).

La vojon al vero oni nur ekvidas per la torĉo de genio.

(Altet).